

Perokula navigado, ĉar neniu radaro funkcias, neniu aparato aŭ scienca programo aŭ artefarita intelekto povas indiki al ni, kiel aspektos la mondo en majo aŭ en junio. Iu gvidado nun malfacilas.

Unue mi volas esprimi deziron, ke vi ĉiuj estas en bona sanstato, same kiel viaj gefamilianoj. Ni vivas en malfacila momento en la tutmonda historio pro eksplodo de tre danĝera pandemio, kiu kaŭzas damaĝojn gigantajn kaj produktas enormajn modifojn ne facile digesteblajn en ĉiuj sferoj de la socioj. Ni devas iri kuraĝe antaŭen, en atentego pri nia propra sano, en flegado de la malsanuloj kaj maljunuloj, en solidareco kun niaj najbaroj, en inventemo pri novaj vojoj kaj novaj vivmanieroj. Esperantistoj bone konas solidarecon kaj povas esti modeloj en tio (fidele laŭ Hector Hodler¹). Por ni nun estas ankaŭ granda avantaĝo interŝanĝi informojn pri la epidemio per niaj multnombraj kontaktoj². Mi povas informi vin, ke mi loĝanta en Svislando devas resti hejme. Kiel emerito mi havas proksimume saman vivon kiel antaŭ la epidemio. Tamen mi ne plu havas ian socian kontakton; kunsidoj de vilaĝaj komisionoj mankas, partopreno en kulturaj aktivecoj en la najbaraj urboj mankas, kunveno kun miaj familianoj mankas. Feliĉe ekzistas telefono kaj interreto por komuniki, kaj gazetoj, radio kaj televido por akiri informojn kaj distriĝi.

La estraro de la Ligo ILEI devos baldau fari decidon pri la julia Kongreso en Kebekurbo. Ĉu ĝi povos okazi jes aŭ ne. Nia decido dependas de decidoj de registaroj, de la pluekzisto de flugkompanioj, de la nova komerca mondordo. La fizika planita ILEI-Kongreso en Kebekurbo estas Plano A, kiun ni povas nuligi senkoste ĝis la 15-a de majo. Ni provas ĉiumaniere jam nun pripensi pri Plano B, kiu estus virtuala kongreso en la sama semajno kaj pri universitata simpozio, kiu povus esti reta kaj registrita, tiel ke niaj membroj povu sekvi la prezentojn kaj debatojn en la reto poste. Fakto estas, ke ILEI havas kanalon che Youtube: Esperanto + Edukado ILEI.

Jam nun, ni povas anonci, ke

- la malalta aliĝkotizo antaŭvidita ĝis la 31-a de marto daŭros ĝis la 15-a de majo.
- La aliĝkotizo estas transdonebla al alia persono, kaze de ne eblo atingi Kanadon
- La unua numero de *Juna Amiko* 2020 1 estas libere elŝutebla en la paĝaro www.ilei.info; tiuj personoj, kiuj devas restadi hejme pro la pandemio povos legi kaj ĝui ĝin, kaj espereble emos abonon la revuon.

Bonvole ricevu elkorajn bondezirojn pri rezisto al la viruso kaj kuraĝa trairado de la elirmalpermeso/trudizoliĝo.

Nome de la estraro plej amike salutas

Mireille Grosjean Prezidanto de ILEI

¹ Pri Hector Hodler vi povas legi la Revuon Esperanto, kiu estas libere elŝutebla el la paĝaro www.uea.org

² Pri la pandemio bonvole iru al www.edukado.net FILMEJO, jen la mallonga ligilo t.ly/nWDKx Tie fakuloj raportas en Esperanto.